

Reapero de la romaneto *Anni kaj Montmartre* de Raymond Schwartz
ĉe la eldonejo Dansk Esperanto-Forlag
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 578 1974.11.06 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La tre aktiva eldonejo Dansk Esperanto Forlag ĉisomere reaperigis la famiĝintan romanon de Raymond Schwartz : *Anni kaj Montmartre*, kiun ilustris Raymond Laval, tio laŭ tipofseta represo de la eldono de 1930.

A.- Tiu reeldono estas bonvena, ĉefe en la momento, kiam oni ekkonscias pri la beletra talento de Raymond Schwartz. Temas pri optimisma romaneto, kiu priskribas la aventurojn de Anni Laufer, plej aminda infan-vartistino depost jam tri jaroj en la servo de la familio Brauer. Pro malamo al la bonaj moroj de ŝia protektantino, fraŭlino Engelbein, ŝi decidis deskui la jugon, kiu ŝin subpremadas. Ŝi volis vivi, plenvivi. Tiucele ŝi plenfide sin ĵetis en la brakojn de la vivo, tio estas, pli precize, en la brakojn de Gustav. Ŝi mizere vagados sur la pavimoj de Montmartre. Tie ŝi nekonscie retroviĝos en la brakoj de alia viro, kiu provos fari el ŝi sian sklavon. Ŝi fine venkos Montmartre, tiun homo-manĝantan monstron.

Cl.- La optimismo de Raymond Schwartz konstante respeguliĝas, En la plej profundaj malesperoj Anni subite retrovas la ridon. Kaj ĉio finiĝas pli bone, ol oni antaŭvidis. Tamen ne temas pri facila elturniĝo fare de la aŭtoro. Temas pri konstato, ke en neniuj situacio ĉio estas malhela. Ĉiam kaj ĉie por tiuj, kiuj havas iom da humuro, oni povas retrovi la feliĉon, aŭ almenaŭ la ridon.

A.- Ni donu ekzemplon. La romano komenciĝas kun plora situacio. Anni Laufer en sia ĉagreno, en sia malamo al fraŭlino Engelbein, ŝia protektantino, pro vortludo, retrovas por momento bonhumoron. Aŭdu :

Cl.- « *En subtegmenta ĉambro korsire taktis lamentado. Anni Laufer, plej aminda infan-vartistino, depost jam tri jaroj en la servo de la familio Brauer, - D-ro Erich Brauer, advokato, - Anni laufer ploris.*

Ve ! ve ! ve ! – Por taksi proksimuman amplekson de ŝia ĉagreno oni bezonus mezurilojn de l' astronomio. Kaj tiel insiste kaskadaj sopiroj skuegis ŝian bruston, ke sentema kadro de l' ferlito komplete kungrincis.

Pri ĉio estis kulpa tiu bigota meleagrino, tiu seka stango, tiu platbrusta birdtimigilo, tiu malnova skatolo, kiu nomiĝis – pompe, sed trompe, - fraŭlino Amalie Engelbein ! »

A.- Engelbein en la germana lingvo signifas 'anĝelkruro'.

Cl.- « *Nun Anni Laufer ekridetis tra siaj larmoj. Depost multaj jaroj ŝi konis fraŭlinon Engelbein, prezidantinon de la bonfara societo 'Junularprotekto', - sed hodiaŭ unuafoje tiu nomo konkretiĝis kaj elvokis en ŝia menso memoron pri rondetaj ŝinketoj de rozkoloraj anĝeloj, kiajn oni ofte vidas sur piaj bildoj. Tiu senrespekta ekskurso de ŝia imagpovo malpezigis ŝian koleron. Nevole Anni ridetis :*

Anĝelkruro ! – Jes ja, du alumetojn ŝi havas, la fumaĵita haringo !

Sed pripensinte ŝi devis konfesi : Finfine, kion oni scias pri la kruroj de fraŭlino Engelbein ? Acidan esprimon de ŝia ranca pomvizaĝo oni povas konstati. Ŝian severan karakteron de maljuna virgulino oni toleras. Ŝian nedifineblan aĝon oni supozas. Sed pri ŝiaj kruroj ? Ilin verŝajne neniam iu vidis. Eĉ hodiaŭ, kiam en Allenstein oni portas laŭmode mallongajn jupetojn, fraŭlino Engelbein prudece kaŝas eblajn ĉarmojn. Ĉiam, de memorebla tempo, la rando de ŝia jupo tuŝis almenaŭ la maleolojn. »

A.- Ni sufiĉe longe citadis, ĉar ekster la larmoj, kiuj transformiĝas al rido, tiu teksto mirinde priskribas la personecon de la protektantino de Anni, ho, tra la okuloj de la knabino, tra la okuloj de la kolero kaj de la malamo. En tiu romaneto pluraj personecoj tiel reliefiĝas, ĉu per detala portretado, ĉu per disaj frazetoj. Antaŭ ol legi al vi unu plian portreton, jen ankoraŭ paragrafon pri fraŭlino Engelbein vidata de Anni :

Cl.- « *Fraŭlino Engelbein ne konversacias ; ŝi predikas. Ŝiaj movoj estas regulaj, laŭ ritmo nevariebla, antaŭe sentita; ili estas gestoj de oficanta pastro. Ŝiaj penetrantaj okuloj estas boriloj, el kiuj ne rezistas granito de plej fermita konscienco. Ŝi neniam ridetas, - ankaŭ neniam ŝiaj trajtoj kuntiriĝas al doloresprimo. Ŝi ne estas el sango kaj karno, - ŝi estas gipsstatuo forlasinta sian niĉon en kapelo. Ŝi ne havas vivon, sed nur moveblecon. [...]* »

A.- Jen la portreto de sinjorino Brauer, je kies servo deĵoradis Anni :

Cl.- « *Sinjorino Brauer, impona staturo, similis al mallerte kunrulita neĝhomo. Ŝi konsisti el tri globoj. Dika bulo : la kapo ; - pli dika bulo : la busto ; - dikega bulo : la malsupra parto. En la kuirejo oni kromnomis ŝin 'la baleno'. Ŝia nura pezo estis konstanta minaco. Tiele ŝi staris antaŭ Anni, apogante grasajn pugnojn sur la koksoj kaj el ŝia kvarangula fiŝbuŝo solene falis ĉiu vorto de kvazaŭ-verdikto. »*

A.- Oni komprenas, ke fine Anni volis deskui tiun jugon kaj vivi.

Cl.- Se vi deziras scii pli pri Anni Lauber, legu la libron *Anni kaj Montmartre* de Raymond Schwartz, kiun ĵus reledonis Dansk Esperanto Forlag.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!